



*Esperanto*

# EN SKOTLANDO

OFICIALA BULTENO DE LA  
SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA



Ĉion por la Redaktoro sendu al:  
TOM FRASER,  
2 Lady Helen Street,  
Kirkcaldy, Fife.

Abonojn sendu al la Kasisto:  
Fino ANNE EYRE,  
17 Kelvin Gardens, Hillhouse,  
Hamilton, Lanarkshire.

## ESPERANTO EN SKOTLANDO

La Oficiala Bulteno de la Skota Federacio Esperantista

N-ro 63

Somero 1966

Jarabono, 3 ĝil. (6 steloj)

La 6la Kongreso de la Skota Federacio okazis de la 3a ĝis la 6a de Junio ĉe Alloa en Gean House, alloga kampara domo konstruita en 1912 de la familio Forrester-Paton, kiu estris la bone konatan lan-fabrikejon, Patons & Baldwins, kaj kiu donacis sian belegan hejmon al la 'Temperance League' en 1951.

Vendredvespere, S-ro Lawrence Mee, la Prezidanto de la Federacio, bonvenigis la mondfaman poeton William Auld, de Dollar. Tiu prelegis sub la titolo, "Miaj dudek jaroj de esperantisteco". Li lernis la lingvon en 1947, redaktis "Esperanto en Skotlando"n dum kelkaj jaroj kaj ankaŭ, poste, "Esperanto"n kaj la kulturan revuon "Monda Kulturo"n (kiu nun devas ĉesi pro malfaciloj financaj). La libro "Kvaropo", verkita de Auld, Dinwoodie, Rossetti kaj Francis, enhavas nur originalajn verkojn kaj ĝi honore disvastigis la nomon de Skotlando tra la Esperanta mondo.

Al multaj el la ĉeestantoj la antaŭe menciita informo, donita de Prezidanto Mee en sia prezento de la prelegonto, estis nova. En la parolado, nur parton de kiu mi povas skizi, S-ano Auld priskribis ekzemplon de la kontraŭstaro kiun edukaj instancoj metas al la endonduko de Esperanto en la lernejojn. Li ankaŭ detale refutis la kritikon, ke Esperanto ne produktas altkvalitan originalan literaturon - oni deklaras, ke egaluloj de Shakespeare, Milton kaj tiel plu ankoraŭ ne aperis en Esperantujo. Prave, sed svarmas en la aktuala angla literaturo mezkvalitaj verkoj kaj malbonkvalitaj ankaŭ, kun kiuj la aktualaj esperantaj povas tre bone elteni komparon. Krome, se nia literaturo ankoraŭ ne posedas sian "Ŝekspiron" kaj "Miltonon" ĝi jam havas sian "Ĉaŭceron" - Kalocsay. Analoge kun Chaucer, Kalocsay tradukis milojn da versoj en junan lingvon ankoraŭ ne rekonita kiel literatura perilo, tiel evoluigante ĝin, ke ĝi fariĝis taŭga por eĉ la plej grandiozaj verkoj.

Sabatmatene la pluvo ne ĝenis nin ĉar ni sidis en komfortaj seĝoj rigardante du esperantigitajn filmojn; "Spuroj de la Historio" montris romaniajn post-signojn antikvajn, kaj novajn konstruaĵojn en la germana urbo Mainz. En la tre alloga kolorplena filmo pri Aŭstralio ni vidis sukerkanejojn, tritikejon, frukt-arbejojn, indiĝenajn birdojn kaj bestojn. Ŝajnas, ke finfine la aŭstralianoj solvas per irigacio la grandan problemon de akvomanko.

Tre plaĉis al ni bonvenigi du infanetojn al nia kongreso; unu estis Kevin, la dumonata filo de Jack kaj Miss Casey, Glasgovo; la dua, Jonathan, dekmonta filo de David kaj Jean Bissett, Motherwell.

Aferkunsido okazis sabaton posttagmeze. La Prezidanto, S-ro Mee, raportis ke li mem vizitis grupojn en Edinburgo, Fife kaj Glasgovo dum la pasinta vintro. Kune kun kvin skotoj li ĉeestis la Britan Kongreson en Norwich. Li havis la

honoron inviti oficiale la Britan Kongreson al Glasgovo por la venonta jaro. Oni elektis Jack Casey la nova prezidanto de la Skota Federacio, kaj re-elektis Anne Eyre la kasisto kaj R. Calder la sekretario.

Post la temango, ni vidis la filmon 'Angoroj' kiu antaŭ nelonge alvenis en Britujon kaj kies parolado estas tute esperanta. Gaja amuzvespero sabate tre gajigis kaj feliĉigis ĉiun.

Fino P.C. Sinclair simpatie gvidis la diservon dimanĉon matene, post kiu la plej multo veturis per luksa aŭtobuso ĝis "Wallace Monument" apud Stirling kie ni supreniris "Abbey Craig" 360 futojn alta deklivo sur kiu oni konstruis la monumenton por honori la skotan heroon, William Wallace, kiu batalis en la 13a jarcento por liberigi la patrujon. La elvido al la Forth-ponto en la oriento kaj la montoj preter Lagoj Lomond kaj Long en la okcidento estas majesta kiam la suno brilas.

Post tagmanĝo S-ro Miskimmon el Hamilton tre afable prelegis pri sia ĉirkaŭmonda veturo al la Universala Esperanta Kongreso en Tokio en 1965. La kliŝoj pri la apud-oriento kaj la malproksima oriento tre plaĉis la aŭskultantaron. Ankaŭ vizitis Tokion D-ro de Prus, Falkirk, kiu ĉeestis internacian Kongreson de Akupunkturo kie kunvenis el dudek landoj cent kuracistoj. D-ro de Prus prelegis pri radiosterio en medicina praktiko. Por akupunkturo oni uzas malgrandajn metalajn pinglojn kiuj aplikigas al certaj punktoj sur la homa korpo.

Tro baldaŭ alvenis la adiaŭa horo. Ni memoru la prezidantajn vortojn: se eblas, ĉeesti: Skotajn Kongresojn, Britajn Kongresojn, Universalajn Kongresojn: aliĝu al B.E.A. kaj U.E.A.: kuraĝigu, plifortigu kaj instigu ĉiun ĉie: por la stelon enlande kaj eksterlande.

Margaret Jackson.

Statistika aldono de la Kongres-sekretario:- Ekskluzive de 3 gejunuloj kaj 2 beboj, 41 anoj aliĝis kaj partoprenis la Kongreson; el tiuj, 33 tranoktis en Gean House kaj 8 ĉeestis nur sabate. Krome, 4 gesamideanoj, kiuj sciis ke ili ne povos ĉeesti, subtenis la kongreson, sendante aliĝkotizon aŭ/kaj donacon.

\* \* \* \* \*

### Korekto

Eraro enŝteliĝis en nian lastan numeron. Ni skribis, ke Fino Janet Caw, kiu pasis for la 22an de januaro nunjare, estis la plej malnova ano de la Edinburga Societo. Tio estis eraro. Feliĉe almenaŭ unu pli malnova ano ankoraŭ vivas, nome S-ino Mima Simons. Ŝi aliĝis en 1908 kaj gajnis la Diplomon en 1910. Kvankam surdeco malhelpas al S-ino Simons ĉeesti la Societ-kunvenojn ŝi ne perdis intereson aŭ en la Societo aŭ en nia Bulteno. Ke ŝi atente legas nian organon, ni ricevis definitivan pruvon !

Fife StudRondo piknikos la 13an de aŭgusto en Beveridge Park, Kirkcaldy. Renkontigu je la 3a ĉe la pordo apud Raith Gates. Halen se pluvos. Ĉiuj bonvenaj!

OKAZIS FRUMATENE EN NORDA BOHEMIO

Sur la elektraĵoj dratoj kuŝis multe da prujno. Tio ne plaĉis al la lokomotivestro Stěpan. Prujno sur dratoj aspektas bela sed sur reloj ĝi estas la plej malbona afero kun kiu oni povas renkontiĝi; radoj de vagonoj sur ĝi fariĝas glitemaj. Stěpan demandis sian helpanton, "Ĉu ni havas sufiĉe da sablo en la sabloŭtiloj?" "Jes", diris la junulo.

Stěpan ekveturigis forte la maŝinon sur la reloj. Apud la supra vapora servmaŝino atendis ilin la inspektisto. "Ĉu vi kuraĝas malsupren veturi?", li demandis. Stěpan dum momento rigardis ĉirkaŭe. Jes, la nebulo estis densa kaj sur la reloj glacio. Sed ĉu li povas diri ne? Do li kapjesis. Intertempe lia helpanto alkroĉis la vagonojn kaj la lokomotivo malrapide ekveturis sur la milda deklivo. La bremsoj knaris sed aliel ĉio bone funkciis. Okaze de la reveturo sursaltis la lokomotivon la maljuna gardanto. "Vi farus nun plej bone, se vi unu horon atendus", li ekkriis al ili. Stěpan ekklinis sin al la maljuna viro, "Ne eblas. Ĉu vi scias kiom multaj tunoj da karbo ni ne liverus?"

Sed supre montriĝis nova malhelpo. Komencis forta blovo. La inspektisto, kiam la servmaŝino jam ŝargis ĉiujn vagonojn, haltigis por momento la trafikon. Li diris, "Mi alvokis ankoraŭ unu lokomotivon. Ĝi helpos al vi bremsi." Post momento alveturis la helplokomotivo. Ili alligis ĝin malantaŭe post la vagonaro kaj antaŭ la vagonaro veturis kun sia pro pureco brilanta maŝino, Stěpan. "Knaboj", diris li al tiuj en la malantaŭa maŝino, "Se venos pleja malbono, funkciigu retre vian vaporon."

Ili malrapide ekveturis. La vaporo siblis kaj la vagonoj, plensargitaj de karbo, ete balancigadis sur la reloj. "Ĉio ĝuste funkcias," diris por si Stěpan. La vento daŭris forte blovi. Stěpan komencis bremsi kaj ĉar li sentis, ke la radoj glitas, li ordonis al la helpanto ŝuti sablon. Ankaŭ la malantaŭa lokomotivo bremsis sed malgraŭ tio la tuta, plensargita vagonaro veturis pli kaj pli rapide. Kaj la plej kruta deklivo nur venos! La helpanto forte skuas la stangon de la sabloŭtilo, sed vane. La vagonaro veturas ĉiam pli rapide. Stěpan bremsas ankoraŭfoje - kun la sama rezulto: la radoj ne turniĝas, sed glitas. "Kial ne efikas la sablo?" Fulme ekkomprenis Stěpan - la forta flanka vento forportas la sablon kaj la reloj restas glataj kun siaj nedika tegaĵo de glacio kaj malseketa prujno. Li tuj ĉesas bremsi, ĉar la neturniĝantaj radoj sur la glataj reloj estas ankoraŭ pli danĝeraj. Sed la nespertuloj en la malantaŭa lokomotivo ne ekkomprenis sed bremsis plu. Ilia maŝino, kies tasko estas helpi ĉe bremsado, subite fariĝis glitveturilo; la neturniĝantaj radoj glitas sur la glataj reloj kaj la maŝino anstataŭ bremsi, ankoraŭ puŝas per sia pezo la ŝargitan vagonaron kaj plirapidigas jam sufiĉe danĝeran impeton. Vane ili ambaŭ frapas, subite terurigitaj, sur la vandojn de la sabloŭtilo; la reloj restis plu glataj.

La maŝino de Stěpan eligis longan plendon; li per fajfado volis averti la malantaŭan lokomotivon. La vagonoj ebrie ŝanceliĝis sekve de la rapida veturo sur malebenaj reloj. Se ili nun elfalus de la reloj, piste ĉio frakasigus. Tion ekkomprenis ankaŭ tiuj en la malantaŭa maŝino. En la sama momento la ŝargita vagonaro alveturis ĝis la plej kruta deklivo. Stěpan sciis, ke ili vane bremsas. Li provis ekfunkcigi retre. La maŝino ekĝemis, sed tamen li sentis, ke ĝi ne helpas. La freneze galopantan vagonaron oni ne povas haltigi. Kiel ĥoro de diabloj la vagonoj obtuze bruegis en sia antaŭen-dancado. Ĉiumomente povis iu el ili elfali.

Krizo! Kaj jen, la senespera helpanto, kies frunto ŝvitegas, ekvidis kiel el la malantaŭo forsaltis ambaŭ junuloj. Ili ne kredas, ke la vagonaro povos esti sekure haltigita. La helpanto kaj Stěpan estas sola duo por la tuta vagonaro!

"Ni ne povos bridteni ĝin!" krias la helpanto kaj malfermas rapidege la pordeton. Samtempe li demandeme rigardas la palegan vizagon de Stěpan. Sed tiu ne respondas. Ree li ekfunkciigis la returnan vaporon. Ree vana; la vagonaro kuregas plu. Stěpan fikse rigardis antaŭ si. Per unu mano li denove malfermas la sabloŭtilon; per la alia li provas la bremsilon ..... Nenio ..... "Elsaltu!" li bojis al la alia. "Sed kio pri vi?" balbutis la knabo. "Elsaltu!" La helpanto senvorte elsaltis en la nebulon kaj deruliĝis sur la frostitan argilon.

Nun estas Stěpan sur la tuta vagonaro tutsole . . . . kaj hejme atendas la edzino . . . . kaj infanoj. Kio restas? Elsalti ankaŭ kaj lasi la tutan vagonaron flugi preter la vojturniĝo kontraŭ la karbejan murbarilon kaj tiel frakasigi? Vivo estas bona afero, jes; sed tiu ĉi maŝineto estas ja ankaŭ parto de lia vivo . . . . la laboristoj komisiis ĝin al li. Ĉu li povas ĝin forlasi? Ne!! Kaj eble estas ankoraŭ espereto . . . .

La vagonaro kuregis en la ravinon. Nun plu restas vere nenio ol laŭveturi je tiu ĉi ĵetrapido la vojkurbiĝon preter kiu kuŝas jam la fino - - solida muro.

Sed ĝuste ĉi tie en la valetto estas la hurliĝanta vento sufokanta. Ĝi ankoraŭ plenforte transblovas supre tie sur la plataĵo sed ĉi tie ne. Ĝisfalis la relojn la unuaj sableroj. Tuj komencis frotegi la radoj. La sabloŭtalo ĉiam pli densiĝis; la vento ne povis plu forporti ĝin flanken de la reloj. Stěpan sentas, ke la glitinta maŝino komencis obei la bremsan. Fine li malfermas plene la sabloŭtilon - denove ekfunkciigas la returnan vaporon - - - denove bremsas. Aŭdiĝas terura knarado. Sur la reloj ŝpruciĝas fajeroj. Ŝajnas, ke la tuta vagonaro devas sin disŝiri - sed ĝi malpliĝis sian rapidon. La vojkurbiĝon la trajno rimarkinde malpli rapide laŭveturis. Ankoraŭ iomete pli multe bremsi; sed la reloj jam finas . . . . Jam . . . . Aŭdiĝis obtuza bato. La lokomotivo ekfrapegis trabon, la trabon kiu estas antaŭŝirmilo montranta, ke tuj post ĝi la reloj finiĝas definitive. La trabo rompiĝis - sed nur per la lasta spiro de la vaporanta giganto. Kaj ĝi kun sia tuta aro da vagonoj senmove - staris. Subite regas ĉie silento. Ĝi impresis kiel ŝoko. Vakuo. Nenieco. Nur la blanka nebulo saturis ĉirkaŭe.

Sed nelonge tio daŭris. Ie malantaŭe vokas kurantaj homoj. Stěpan ne aŭdas. Senmove li staras en sia loko kaj sentas kiel la sango frapas en liaj tempioj. Riveretoj da ŝvito elfluas de lia frunto malgraŭ la malvarmo. Nur nun vere ektemiĝis liaj genuoj. Nur nun li ekkomprenis, kiel proksimis al li la morto. Kaj li palpe elserĉis la vojaĝbotelon kun kafo kaj trinkis profunde.

Al la inspektisto kiu alkuris unue, li diris nur, "Ĉio en ordo." Sed jam estas ĉi tie la helpanto. Li prenas Stěpan-on ĉirkaŭ la ŝultroj, tiom li volis sin konvinki, ke estas Stěpan vere vivanta. Post kelkaj minutoj pli, ĉirkaŭis la maŝino de Stěpan multaj homoj. La inspektisto montras al Stěpan kaj diras, "Rigardu! Heroo!! Vere la heroo."

Stěpan nur ridetas. Kia heroo? Tio ja estas lia devo. Ili konfidis al

li la maŝinon kaj li ne povis ja lasi ĝin frakasiĝi. Kiam ili jam retroveturis kun la ŝarĝo al la malŝarĝejo, diris la helpanto admire, "Mi ŝatus esti homo kia vi!" Stěpan nur ekridetis, "Tio estas ja nenio . . . oni devas ŝati sian laboron kaj sian maŝinon."

"Kaj la vivo?" Stěpan denove ridetis, "La vivo kaj la maŝino - tio estas la sama, ĉu ne?" Li ekprenis la stangon de la fajfilo. Super la karbminejkampo eksonis gaja ekkrio de ilia lokomotivo. Tiel klara, ke ĝin povis sufoki eĉ ne la nebulo. Ĝi sciigis al la tuta minejo, ke veturas Stěpan sur sia maŝineto. La homo kiu plenumis sian devon.

\* \* \* \* \*

Aperis el la nun foriĝanta nebulo la maljuna gardanto akompanate de la ĉefmeĥanikisto de la riparejo. Ili ŝajnis ne vidi Stěpan-on kiu restis en sia direktejo dum oni prilaboris la vagonojn. La paro zorge ekzamenis radojn, aksojn kaj tiel plu. Elmetis la kapon Stěpan. Malrapide sin turnis la maljunulo, "Filo mia, ĉiu medalo du flankojn posedas. Feliĉe ĉiuj vidas nun nur la heroan flankon: bone; sed mi vidas ankaŭ la alian flankon de via medalo. Mi volas nur bonon por vi. Ne donu kaŭzon denove por la apero de tiu aliflanka bildo."

Stěpan longe kaj serĉe rigardis la maljunulon, poste ili ambaŭ en la sama momento etendis la manojn kaj silente reciproke premis ilin.

Jaroslav Skramusky.

LAŬDI, JES, SED LAŬDI TRAFE!

Estas bone, ke la skota esperantistaro konstatu la talenton kaj la elstarajn donojn de William Auld al la Esperanto-kulturo. Permesu tamen noti, ke tiuj ne konsistas el la Hamleta artikolo, kiu, kvankam taŭga en sia speco, tute ne estas tia pinto de klerismo, kiel pretendas nia redaktoro; nek el la 'energia repliko al recenzo': letero multe pli gaj-aplomba, ol saĝe bazita, kiel montras la riposto de J. H. Sullivan en marta B.E.; sed la unika kaj eminenta kontribuo de Auld troviĝas en lia originala poezio kaj majstraj poeziaj tradukoj, el kiuj la plej gravaj ankoraŭ ne vidis (bedaŭrinde) la lumon, nome la URBO DE TERURA NOKTO (The City of Dreadful Night), de James Thomson kaj longa parto el DON JUAN de Byron. Al tio necesas aldoni du gravajn kompilojn, la ESPERANTA ANTOLOGIO (poemoj 1887 - 1957) kaj la ANGLA ANTOLOGIO, kies poezian parton li redaktis. Estis sendube pro tiuj grandaj servoj al nia kulturo, ke li fariĝis membro de la Esperanta Akademio - fakto strange ne menciita en la redaktora rimarko, sed certe ankaŭ tion la skotoj devus fieri. Jes, ni honoru Vilĉon Auld, sed saĝe kaj trafe! Cetere, ĉu estus tro kaprice atentigi, ke mem Auld estas anagramo de laŭd' ?

R. Rossetti.

BRITA KONGRESO

La 50a Jubilea Brita Kongreso en Norwich estis sukcesplena okazo, kaj la organiza komitato meritas gratulon kaj dankon pro la perfektaj arangoj. Pluraj skotoj ĉeestis, inkluzive de la kredeble plej maljuna kaj plej malproksime loĝanta, S-ro J.P.W. Murray el Fochabers.

Oficiala interesigo de la urbo montriĝis unue ĉe oficiala akcepto fare de la urbestro en la kastelo, kaj due ĉe nomceremonio antaŭ la Publika Biblioteko de Norwich kiam la tiea strato ricevis la nomon "Esperanto Way."

Inter la parolantoj estis D-ro Ivo Lapenna, kiu raportis pri kuraĝiga vizito al orienta Eŭropo. Alia estis S-ro Fred Parker, kiu diris, ke ni devus akcenti la utilecon de Esperanto en komerco. S-ro R. Markarian parolis ĉe kunveno al kiu la publiko estis invitita, sed la nombro de ne-esperantistoj estis bedaŭrinde malgranda.

El la ekskursoj la plimulto elektis tiun per boato al Norfolk Broads, kaj tuttaga sunbrilo certigis ĝian sukceson.

La distra flanko estis tre altklasa. Precipe menciindaj estis viraro da "Morris" dancantoj, kaj infanaj prezentoj de alilandaj popoldancoj.

Multaj al kiuj mi parolis intencas partopreni la 51an Britan Kongreson en Glasgovo en 1967. Ni skotoj devos faldi la manikojn se ni volas egaligi ĝin al la jubilea.

H.M.

-----  
Ankoraŭ pri THE CULTURAL VALUE OF ESPERANTO de D.B. Gregor.

"Artefarita estas tendenca vorto", skribas Gregor. Ĝi ankaŭ estas korekta vorto kiam oni parolas pri lingvo, ĉar la lingvo apartenas al la regno de la arto, sed ne de la naturo. Diri, ke Esperanto estas 'Artefarita' dum la etnaj lingvoj estas kvazaŭ naturaj, havus similan sencon, kiel diri, ke la skotaj limlandaj baladoj estas 'naturaj' kaj la poemoj de Burns 'artefaritaj'. Zamenhof diris, ke la naciaj lingvoj estis kreitaj blinde kaj la internacia lingvo konscie, sed ambaŭ same estas artverkoj, kiel Mona Lisa aŭ la simfonioj de Beethoven. Unu distingo inter lingvo kaj aliaj artverkoj estas tio, ke la lingvo estas ĉiam, kiel socia instrumento, verko kolektiva, simile al la Biblio aŭ la Tapeto de Bayeux. Sed efektive, se oni pensas pri la Bajeux-verko, aŭ pri gotika katedralo, oni trovas kreaĵon pli similan al Esperanto, ol al la etnaj lingvoj; nome, ke iu donis la ĝeneralan planon kaj multaj ellaboris la detalojn. Aliflanke, moderna konstruaĵo, ellaborita de arkitekto, pli similas la individuan artverkon.

Lapenna ja diris, ke se nia gepatra lingvo estus natura, ni ne estus devigataj ellernadi ĝin dum la tuta vivo.

Permesu unu subnoton al la komento de S-ro Fettes: por 'taciturn fellow' pli rekta traduko estus 'silentemulo' (latine: tacere = silenti), kaj la esprimo 'ĉiesulino', kiun S-ro Fettes prave admiras, venas fonte ne de Auld, sed de Baghy.

R. Rossetti.

SPUROJ DE LA HISTORIO  
(vidita ĉe Gean House)

Ĉi tiu filmo temas pri la urbo Mainz kaj celas montri la interligiĝon de la antikva kun la nuntempa urbo. La nova urbo ĉe kiu kunfluas du riveroj Main kaj Rhine, estas konstruita ĉirkaŭ la romaniaj restaĵoj de la malnova urbo. Ankaŭ en Mainz Gŭthenberg inventis la pres-arton kaj en 1455 lia unua libro aperis - la Biblio.

La filmkomentario estas esperantlingva tre laŭta sed ne sufiĉe klare elparolita aŭ eble reproduktita. Sekve, dum mi streĉis la orelojn, por pli bone aŭdi, mia atento estis distrita for de la ekrano. La filmo estis monokroma kaj bone fotografita sed ŝajnis al mi, ke ĉi tiu kopio estas iom malpura kaj makulita. Ankaŭ la komentisto rapidigis nin tra multaj ruinaĵoj kaj saltis de unu loko al alia kun rapideco kiu kvazaŭ senspirigis min, kaj je la fino de la 'ekskurso' mi sentis ke mi estis vaginta inter mur amaso da rubo, senviva, malĝojiga kaj teda.

Sendube tia temo ne povas teni la intereson de multaj personoj krom se oni prezentas ĝin laŭ ĵre lerta kaj interesa maniero. Tion ĉi tiu filmo ne faris. Ĝi ne estas por mi memorinda, krom la fino, kiu prezentas trankvilan scenon de boatoj sur la rivero, montranta la senfinan, neŝanĝiĝantan daŭrecon de la ĉiutaga vivo, la pasinteco miksiĝanta kun la nuntempo kaj fluanta antaŭen en la estontecon. Tio ja donis al mi la esperon, ke malgraŭ la sento de mortinteco, kiun mi ĵus spertis, ankoraŭ batas la koro de Mainz. Tamen ĉi tiu filmo ne pentris por mi allogan bildon de Mainz kaj certe ne donis al mi la inklinton iam viziti ĝin,

A. Eyre

MALLONGE:

TEJO sendis la "Tria Oficiala Informilo"n pri sia 22a Kongreso en Pecs, Hungario. Praktika informo al kongresantoj. Ni donos ĝin al la unua petonto.

SKRIBU AL Turistbyran, Gamla Teatern, Storgatan 1, ÖREBRO, Svedujo, por alloga faldfolio donanta multan informon pri Örebro kaj ĉirkaŭe kiel feriejo.

PETU artisman, belan prospekton pri ceramikaĵoj de Ĉeĥoslovakio, kiun tieaj esperantistoj sukcesis eldonigi, ĉe ZK Esperanto, Prerovske Strojirny, PREROV, Ĉeĥoslovakio.

OKAZIS je 8a ĝis 12a de junio, "Unua Brazila Kongreso de Studantoj de Esperanto" en Uberlandia; ĝi diskutis temojn kiajn la instruado de Esperanto; Reduktigo de Poŝta Tarifo por Esperantaĵoj; k.t.p.

EUROPA FERIA SELAJNO denove proponas sian popularan ferion je 4a ĝis 10a de septembro, ĉe Boldern, Svislando. Ni sendos la informon al petontoj.

EUROPO N-ro 3 Trimonata revuo por Eŭropaj federalistoj, estas 30paĝa broŝuro, idealisma, pensiga, praktika: la unuiĝo de Eŭropo estu paŝo al mondfederalismo - garantio por mondopaco.



STRATHKINNESS-STUDRONDO

Mangaĵo estas sen valor'  
 Se apetito mankas:  
 Ni havas ambaŭ: el la kor'  
 Al Dio do ni dankas. \*

Tiel petis la antaŭmangan benon Veterano Robert Mackay ĉe Strathkinness okaze de la 20a Studrondo tie en Youth House de vendred-vespero ĝis dimanĉvespero, 29a de aprilo ĝis 1-a de majo.

Kaj ni ja havis apetiton tiel por la mensa mangaĵo kiel por la korpa. Bonege estas iri al internacia kongreso por renkonti diversnaciajn esperantistojn sed ne malpli grava estas la partopreno de ordinaraĵ grupkunvenoj kaj specialaj regionkunvenoj kiaj Strathkinness-Studrondo. Kiel saniga nutraĵo necesigas fortajn dentojn, tiel la mensa nutraĵo ĉe Strathkinness necesigas fortajn sentojn, atentajn orelojn kaj viglajn langojn. Ni debatis, "Ke la nuna elspezo por spac-esplorado estas prava." La debatproponinto, F-ino Sinclair, Buckhaven, neis, argumentante, ke la bezono por konstrui pacon, helpi al la evoluendaj landoj, fari ordon, enlande kaj eksterlande, estas tiel urĝa, ke la mondo dediĉu sian plenan forton al tio nun. Poste la nun danĝera konkuro inter U.S.A. kaj U.S.S.R. rilate spacesploradon povus fariĝi fruktodona kunlaborado.

Jesis la demandon F-ino Jackson de Hamilton. Ŝi komencis ŝerce, deklarante, ke ŝi ĉiam deziris viziti la lunon kaj nur la spacesplorado ebligos tion al ŝi. De tre juna aĝo ŝi deziris viziti la "viron en la luno" ĉar kiam ŝi estis infano oni admonadis ŝin se ŝi volis ludi dimanĉe, minacante, ke trafus ŝin la sorto de tiu viro kiu, pro kolektado de brulligno dimanĉe, estis transportita al la luno. Daŭrigante, F-ino Jackson memorigis pri la malkredemo de ordinaruloj antaŭ la proponoj de Kristoforo Kolombo por siaj maresploroj kiuj tamen havis tiom grandiozajn rezultojn. Ne malpli ol kvar kontribuoj al la debato venis letere - de S-ano Fraser de Fraserburgh; Poliŝĉuk de Taŝkent; Chvosta de Podebrady (Ĉeĥoslovakio) kaj de Juri Gagarin de Eksterspaco. Laŭ bona okazo, ĉi lasta respondis al precize la sama demando kiun starigis la debato-titolo, sed metita de Uzbeka ĵurnalisto al la mondfama astronauto nelonge antaŭe. Liaj vortoj estis tuj tradukitaj de Petro Poliŝĉuk (gvidanto de la magnetofona fako de la Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofono-Amatoroj (I.L.E.F.) kaj senditaj de li al Strathkinness.

S-ano Sinclair trovis sin en akra malplimulto - nur du aliaj pretis subteni ŝin. Unu kontribuinto al la debato atentigis al la vanta titolo per kiu la fieraca homaro priskribas spacesploristojn, nomante ilin kosmonaŭtoj kvankam ĝis nun la spaceto en kiu ili esploras estas tiel malgranda guteto en la vastega maro de la kosmo, ke, se la tuta tero estas reprezentata de pomo en la meza de la ŝambro, la distanco al la luno ne estas tiel malproksima ol la muro !

Mankas spaco por detale raportoj pri ĉio okazinta - "Notindaj Homoj"; la ekskursoj; la amuzvespero; la agrabla kunlaboro ĉe la domtasketoj. La vetero estis tiel bela, ke la ĉiam verda programero, "Vivanta Muzeo" fariĝis en la sun-

---

\* Burns-benpeto tradukita de R. Mackay

brilo sur herbejo en la ĝardeno. Ĝi donis vastan elekton al siaj partoprenintoj tiel ke ili povis paroli pri io ajn kio interesas ilin. Blage mistifikis Prezidanto Mee per sia laŭdo de mangajo hejme kreskigita, super la ordinara, aĉetita. Nur iom post iom laŭ la evoluo de lia parolo kaj aperigo de la montraĵo ni ekkomprenis, ke temas pri mangajo por varmakvaj fiŝetoj! S-ano Miskimmon montris bildkartaron el la Hiroŝima-mazeo kiun li vizitis okaze de la Universala Kongreso en Tokio. F-ino Eyre liveris bele pentritajn ovoŝelojn de Ĉeĥoslovakio; S-ino Brown de Kirkcaldy, montris bildon de popoldancantoj de "sal-urbo" en Germanujo kaj priskribis la originon kaj prezentadon de ilia unika danco; kaj tiel plu, ĝis la montraĵotablo estis ŝargita de mirinde varia artikolaro, kaj la kapoj, de informoj - kaj kompreneble la kafo kiu interpunkciis ĉiun programon agrable ŝargis alian lokon kies prizorgon la Youth House stabanoj ĉiam sukcese plenumas.

La Rondo por 1967 estos kronologie aparte grava ĉar ĝi estos la 2la. Oni meditas metodon taŭga por ĝin aparte distingi tamen ĝi nepre similos ĉiun antaŭan per tio, ke ĝi estos treege G U D A - Gaja: Universala: Distra: Amikeca.

#### SKOTAJ KANTOJ EN ESPERANTO

Ĉe la skota kongreso en Alloa ni havis la plezuron kanti komune kantojn tradukitajn de William Auld. Mi demandis al mi kial Auld tradukis skotajn kantojn, kiuj jam presigis en la "Kantaro", sed kiam hejme mi komparis, estis ĉe mi nenia dubo pri la supereco de la novaj. Rigardate ne nur laŭ poezia stilo, sed ankaŭ laŭ transdono de la vortoseneco de la originalaj, ili ja pli sukcesas.

Mi volas meti unu punkton antaŭ nian poeton. Kaj li kaj nia forpasinta Agnes B. Deans, tradukante "Will ye no come back again?", uzis la simplan futuran tempon de la verbo - "Ĉu vi ne revenos do?" (Auld) kaj "Ĉu ne ree venos vi?" (Deans). Sed kiam skotoj diras "Will ye no ....." la signifo estas petego, ĉu ne? Mi ne estas poeto, sed mi kredas, ke verso kia "Nepre reen venu vi" aŭ "Venu reen petas ni" pli proksimiĝas al la skota frazero.

Se mi rajtas fari alian sugeston de la vidpunkto de kantanto, en la kvara strofo de tiu kanto mi sekvas la faron de A.B. Deans, kaj akcentus la unuan silabon de ĉiu verso same kiel en la aliaj strofoj. Kantante, oni ne atendas subite trovi kroman silabon, kaj kvankam Baronino Nairns devis devojiri de la ritmo en la skota lingvo, ne sekvas, ke esperantistaj tradukantoj nepre imitu ŝin. Do mi aliigus la Auld-an ĝis io simila al :-

Nokte estis ni azil',  
Tage gardis vin en dom';  
Kontraŭ pundoj tridekmil'  
Ne perfidis iu hom'.

Sed, memoru, kiel tuto la Auld-aj tradukoj al mi tre plaĉas.

R. M.

HAMILTON-GRUPANOJ EKSKURIS la 14an de junio al la Livingstona Memoraĵo, Blantyre. (biografio pri Livingstone aperis en niaj n-roj 50/51 de S-ano Miskimmon). Poste ili vizitis al Bothwell Brig kie la Monumento al la Ĵurligintoj memorigas pri la tiea batalo de skotoj por libereco, politika kaj religia. La 14an de junio la grupanoj gastis ĉe F-inoj Marie kaj Agnes Bray en Wishaw, kie la nov-zelandaĵ fratinoj bonfare laboras por unu jaro, helpante eŭropajn rifugintojn.

MOTHERWELL ĝemeliĝis kun la germana urbo Schweinfurt; do la klaso en Anderson Boyes, kiun gvidas S-ro Mee, skribis al la esperanta grupo tie kaj pliampleksigos tiun kontakton. Ankaŭ en Motherwell, S-ro Mee ĉeestis kunvenon kunvokitan de la urbestro por organizi aktivaĵojn por gejunuloj kiel rimedon por malhelpi huliganismon. S-ro Mee elektigis komitatano kaj laŭokaze atentigos pri la meritoj de Esperanto kiel aktivaĵo efika, inda kaj enda kontraŭ la problemo konstrue okupigi gejunulojn.

#### RECENZOJ

POR LA PACO, IV, estas broŝuro eldonita de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Ĝi konsistas el artikoloj, raportoj, novelo, poemoj kaj kantoj. Parte ĝi estas verkita honore al la Sovetaj Respublikoj, Litovio kaj Estonio sed la ciferoj pri la kreskinta nombro de traktoroj kaj similaj maŝinoj kaj eĉ de universitataj studentoj, kvankam imponaj kaj interesaj l fakuloj, formas iom sekan legaĵon. La novelo, iom neverŝajna, tamen havas seriozan senco kaj sian propran ĉarmon; same la poemo "Glano kaj Glavo" kiu estas dialogo inter "eta glano" kaj "pompoza glavo", kiuj reprezentas respektive la fortojn de konstruo kaj detruo. Jen la fino strofo,

"Ne al glavo, sangon soifanta  
Sed al glano, vivon transdonanta  
Sed al paco, vivon subtenanta  
Sin direktu homo esperanta!"

Alia poemo "Neŭtralulo" vipas tiujn esperantistojn kiuj ne volas lasi, ke U.E.A. fariĝu oficiala denuncanto de la usona militagado en Vjetnamio: ĝi memorigas pri la Baghy-poemo, "Estis li esperantisto". La unua artikolo estis aldonita post komenco de presado, ĵus post la sukcesa alirigo de la aŭtomata sciencostacio "Luno-9" sendifekte sur la lunsurfacon. Oni donas detaloplenan priskribon, kun ilustraĵoj, de la maŝino kaj ĝiaj sciencaj utilo kaj signifo. Ĝenas la multaj lokoj kie vortoj estas arbitre distranĉitaj inter du linioj; "dek/lari", "funda/mento", "revolu/ciuloj", "refu/ti" kaj simile. En postaj eldonaĵoj espereble oni aplikos la regulon nur displiti radikojn kaj gramatikajn finaĵojn. Prezo ne montrita sed la adreso kien oni invitas komentojn estas, Moskvo, ul.Kalinina, 14, SOD: otdel kultury, Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj. Redaktis K. Gusev kaj I. Ĥoves.

(Aliaj recenzoj kaj filmkritikoj, pro spacmanko, aperos en n-ro 64.)

